

Por memoriĝi vin kaj nin mem, jen nia agadpolitiko el junio 2012:

Multaj esperantistoj en Aŭstralio sentas, ke nia asocio bezonas renovigon.

Ni perdis dum la lastaj jaroj multajn spertajn membrojn kaj energion. Niaj celoj estas:

(1) Malfermiteco

Ni volas malfermitan asocion sen sekretoj.

Ni volas ke la membraro sciu, kio okazas kaj kion ni planas.

Ni proponas malfermi kaj publikigi (rete aŭ papere) ĉiujn protokolojn kaj raportojn.

Ni ankaŭ intencas respondi al ĉiu demando de la membraro kaj informi la membrojn per regulaj retmesaĝoj.

(2) Invito al rea aliĝo

Ni intencas inviti ĉiujn eksmembrojn de AEA ree aliĝi al la asocio.

(3) Revigligo de la somerkursaroj

Ni intencas revigligi niajn somerkursarojn. Samtempe ni preferas, ke la kongreso estu parto de la somerkursaro por ebligi pli grandan partoprenon.

(4) Refunkciigo de la libroservo

Ni volas funkciantan libroservon. La ĉefa funkcio estu informado pri eldonaĵoj kaj helpo ĉe mendoj.

(5) Mondeto

Reekzameno de la rilato inter AEA kaj Mondeto.

Daŭra subteno dependu de klaraj gvidlinioj kaj klare atingitaj celoj.

(6) ESK

Ni intencas, ke ESK aperu pli ofte kaj en pli simpla kaj malplikosta formo.

(7) Retpaĝaro

Ni planas, ke la retpaĝoj de AEA estu modernaj kaj aktualaj, kaj daŭre ĝisdatigataj.

(8) Projektoj

Ni intencas subteni finance kaj morale diversajn projektojn de membroj

Kion ni povas raporti? Kion ni atingis? Kion ni ne atingis?

(01) Estraranoj / regulaj kunvenoj

Ni sukcesis okazigi skajp-kunvenojn ĉiun duan semajnon, kaj ĝenerale ĉiuj estraranoj partoprenis.

Ni daŭre publikigis resumon de tiuj kunvenoj en AE (Aŭstraliaj Esperantistoj). Bedaŭrinde kontaktoj aŭ ia ajn reago al tiuj resumoj estis minimumaj aŭ neekzistantaj.

Foje aliaj homoj aliĝis al niaj skajp-kunvenoj, ekz. Dmitrij kaj Bradley el Novzelando. Se vi interesiĝas ial alparoli la estraron, ni tre volonte bonvenigas vin.

(02) Aŭstraliaj Esperantistoj

Kiel en la antaŭ jaro ni konstante aprecas la semajnan bultenon de Roger Springer, “*Aŭstraliaj Esperantistoj*” (AE), kiu daŭre provizas informojn kaj pruvas, ke Esperanto ankoraŭ vivas en Aŭstralio.

Grandegan dankon al Roger, kaj Nicole pro la regula provlegado. Vi restu sanaj kaj daŭrigu labori pri AE ankoraŭ longe.

(04) Komunikado kun membroj

Grandparte ni dependis de la AE de Roger. Krom publikigi regule resumojn de niaj kunvenoj en AE, ni sendis kvar apartajn mesaĝojn al niaj membroj.

(05) Kanbera kongreso – januaro 2015

Ni organizis la kongreson/somerlernejon en Kanbero en januaro 2014. 52 homoj ĉeestis kaj la reagoj estis ĝenerale pozitivaj.

(06) AEA-arĥivoj

La arĥivoj fine trovis sian restadejon en Esperanto-Domo, kaj refoje endas danki Dmitrij pro tio, ke li starigis bretojn, kaj Huigh, ke li regule vizitas Sidnejon kaj komencis la proceduron aranĝi la grandegan kvanton da materialoj en ian ordon.

Elkoran dankon ankaŭ al Ian Wylles, kiu komencis ordigi nian hereditan ĥaoson.

Ni heredis ankaŭ la Esperanto-librojn kaj materialojn de Donald Broadribb, Marjorie Ellyard kaj Kep Enderby. Kaj probable, ke ni – pripensante nian averaĝan aĝon – ricevos ankoraŭ multajn en venontaj jaroj. Kion ni faru?

Ni ankoraŭ serĉas emeritan bibliotekistan volontulon, kiu kapablu kunordigi la proceduron. La longaperspektiva celo diĝitigi kaj do disponi al niaj membroj (kaj la publiko) restas malfacile realigebla longaperspektiva aspiro. Bonvolu helpi!

(07) Libroservo

La libroj, kiuj restis ĉe Robert Budzul en Tasmanio ekde 2007, estis transportitaj al Melburno. Ni provos ilin vendi. Finfine – post multe da “persvadado” – Robert pagis \$1 000, parton de la mono, kiun li ŝuldas (ŝuldis) al AEA. Ni daŭre esperas (esperantistoj!), ke ni ricevos la ceteran ŝuldon. Bedaŭrinde dum la pasintaj jaroj, okazis nesukceso trovi iun funkciigi la libroservon.

(08) Eventoj

Bedaŭrinde ni ne scias pri ĉiuj Esperanto-eventoj okazantaj en la tuta Aŭstralio.

Krom nia ĉefa evento, la pasintjara kongreso en Kanbero kaj la aktuala kongreso en Melburno, jen resumo de la eventoj, pri kiuj ni scias:

Junio: lingva festivalo ĉe Thebarton Senior College, Adelajdo

Septembro: eksposicio ĉe biblioteko Mitchell

Julio: lingva festivalo ĉe Redfern Community Centre, NSK.

(09) Esperanto-TV

Unu el la ekscitaj novaj evoluoj estis la fondo de Esperanto-TV.

Al la estraro imponis la laboro de Richard Delamore kaj liaj helpantoj por ekigi vervan novan manieron varbi por Esperanto kaj ĝin utiligi. Ĝi havas alilandajn adeptojn kaj altiris al Esperanto novajn junulojn.

Ni apogas tiun iniciaton per monata subvencio de \$200 dum 15 monatoj. Ni esperas, ke aŭstraliaj esperantistoj kontribuos al la projekto.

(10) Retejo

Ankaŭ al Jonathan Cooper ni diras grandan dankon pro tio, ke li profesie kaj efike prizorgis nian retejon kaj konstante plibonigis ĝin.

Post pluraj monatoj, dum kiuj nia kunhavata retservilo funkciis tre nefidinde (kaj dum proksimume tri semajnoj en majo la retejo estis tute nefunkcia) la estraro (krom Kam) decidis en septembro transiri al nova, nubobazita servilo de kompanio rekomendita de Jim Radford de Image Direct. Tio preskaŭ finiĝis fine de septembro. Ekde tiam la retejo estas multe pli stabila.

Kiel parto de tiu transiro, ĉiuj subdomajnaj (subdomain) retejoj (precipe por provincaj kaj lokaj grupoj, ekz. wa.esperanto.org.au, kiuj ne estis ĝisdatigitaj dum jaroj) estis forigitaj kaj anstataŭigitaj de paĝoj de la ĉefa AEA-retejo (ekz. aea.esperanto.org.au/wa). Tio multe simpligis la taskon gardi la retejon kontraŭ malicaj retaj atakoj.

Bedaŭrinde, rezulte de tiu nefunkciado de la servilo kaj transiro al nova servilo, ampleksa statistika raporto pri la jaro ne eblas.

Aliaj notindaj ŝanĝoj al aea.esperanto.org.au estas:

- Reorganizado de reteja strukturo kaj menuoj, laŭ la planoj de la januara kongreso de 2014.
- Nova sekcio: “Novaĵoj”
- Ĉiuj pasintaj numeroj de *Aŭstraliaj Esperantistoj* estas elŝuteblaj.

(11) De korporacio al asocio

Dum la jarkunveno ĉe la kongreso en Kanbero la membroj voĉdonis por revenigi AEA al la statuso de asocio. Bedaŭrinde tio montriĝis pli komplika ol oni antaŭvidis, kaj la proceduro nun preskaŭ kompletas. Dokumentoj por ŝanĝi al asocio estis sendita al ASIC kaj ni atendas la konfirmon de la ŝanĝo.

(12) Membronombro

En 2013 ni sukcesis haltigi la malkreskon de membroj kaj iomete pligrandigi la nombron. Bedaŭrinde la membronombro ne pligrandiĝis dum 2014. Je la komenco de decembro estis 103 pagintaj membroj. (111 en 2013)

(13) Esperanto sub la Suda Kruco

Multe da danko al Kam Lee kaj David Ryan pro la daŭra produktado de nia magazino. Bedaŭrinde estis netolereblaj prokrastoj en tiu produktado. Joanne Johns helpis pri la publikigado kaj ni ege dankas ŝin pro ŝiaj talentoj kaj malavareco.

La lastadata numero aperis antaŭ nelonge, kaj ni esperas sperti bonajn diskutojn pri ESK dum la kongreso.

La diskuto, ĉu aperigi nur elektronike, ne progresis.

(14) Lokaj grupoj

Malgraŭ bonaj intencoj, kaj malgraŭ tio, ke tio estis unu el niaj celoj por la jaro, niaj kontaktoj kun grupoj en la lando dum 2014 estas – bedaŭrinde – ankoraŭ malregula.

Pri la sekvaj detaloj ni scias:

- **Sidnejo** – ĉiumonataj kunsidoj en Esperanto-Domo (Redfern), Manly, kaj la meza marbordo.
- **Melburno** – oni daŭrigas ĉiusemajnajn lundajn klubrenkontiĝojn. Ĉi-jare oni bonvenigis novajn membrojn kaj plurajn vizitantojn de aliaj landoj.
- **Adelajdo** – La klubo kunvenas ĉiun unuan merkredon de la monato kaj ni havas almenaŭ ok sociajn renkontiĝojn.
- **Hobarto** – Esperantistoj partoprenis ĉiun lundon en lingva grupo.
- **Kvinslando** – ĉiumonataj kunsidoj en Brisbane kaj Toowoomba.
- **Perto** – ĉiumonataj kunsidoj.

(15) Financoj

Rigardu la anglan version.

(16) Punktoj / ideoj, kiujn ni volonte esplorus dum la jarkunveno ĉe la kongreso

- Ĉu eblas/penvaloras organizi kuman kongreson kun la indoneziaj esperantistoj?
- Kiom valoras lingvaj festivaloj?
- Kiel eblas plibonigi la kontaktojn kun lokaj grupoj?
- Venontaj somerlernejoj? Venontaj kongresoj?
- Ĉu AEA vere bezonas (plene) pagintajn membrojn? Ĉu ĝi povus havi nur interretajn membrojn (kiuj ricevas ESK nur en PDF-formo)?
- Ĉu AEA povus / devus proponi novajn manierojn, per kiuj la membroj renkontiĝu kaj kunlaboru? Ekzemple skajp- aŭ babilejaj renkontiĝoj? Kunlabora retloko (ekz. Create Village) aŭ forumo (ekz. Muut)?
- Ĉu AEA revivigu la libroservon? Ĉu ĝi povus agi kiel agento de UEA aŭ Esperanto-USA?
- Kian engaĝiĝon AEA havu ĉe Facebook, Twitter, Instagram, Pinterest, YouTube, Ipernity, Google+ ...?

Just to remind ourselves and you, this was our mission statement in June 2012:

Many Esperantists in Australia feel that our association needs renewal.

We have lost many experienced members and a lot of energy during the last years. Our goals are:

(1) Openness

We want an open association without secrets. We want the membership to know what is happening and what we are planning. We intend to open and publish (on paper or on the net) all the minutes and reports. We also intend to respond to all the questions from the membership and inform the membership via regular emails.

(2) Invitation to rejoin AEA

We intend to invite all the ex members to join AEA again.

(3) Revitalising the summer school

We are planning to revitalise our summer schools. At the same time we want the congress to be part of the summer school, in order to maximise participation.

(4) Reinstating our Libroservo

We want a functioning Libroservo. The main function shall be information about new publications and help with orders.

(5) Mondeto

We want to re-examine the relationship between AEA and Mondeto.

Ongoing support will depend on clear guidelines and achieved goals.

(6) ESK

We intend to publish ESK more often and in a simpler and cheaper format.

(7) Website

We plan to have an AEA website that is modern, current and continually updated.

(8) Projects

We intend to support, financially and morally, various projects of the membership.

What can we report? What have we achieved? What have we not achieved?

(01) Estraro Members / Regular Meetings

We managed to have our Skype meetings every 2 weeks and generally all of the estraro members participated. We continued to publish a short summary of these meetings in AE (*Aŭstraliaj Esperantistoj*). Unfortunately, the feedback or any reactions to these summaries was minimal to non-existent.

On occasions, other people joined us during the Skype meeting, e.g. Dmitry or Bradley from NZ. If you are interested in addressing the estraro in that way, you are more than welcome.

(02) Aŭstraliaj Esperantistoj

Like the year before, we have continued to really appreciate Roger Springer's weekly magazine "*Aŭstraliaj Esperantistoj*" (AE), which has kept the information flowing, showing Esperanto is alive in Australia.

A big thank you to Roger, and Nicole for the regular proofreading. May you stay healthy and continue with AE in the foreseeable future.

(04) Communication with members

We relied mostly on Roger's AE. As well as publishing regular meeting summaries in AE, we sent out four separate messages to our members.

(05) Canberra Congress – January 2015

We organised the January 2014 Congress/Summer School in Canberra. 52 people attended and the feedback was generally positive.

(06) AEA Archives

They have finally found their resting place in Esperanto House and a renewed thank-you has to go to Dmitry for putting up the shelves and for Huigh for visiting Sydney regularly and commencing the process of arranging the huge volume of materials in some sort of order. A big thank you also to Ian Wylles, who has commenced to put some sort of order into our big historic chaos.

We have also inherited the Esperanto books and materials from Donald Broadribb, Marjorie Ellyard and Kep Enderby(?)... and we are likely – considering our average age – to get many more in the coming years. What shall we do?

We are still looking for a retired volunteer librarian, who would be able to co-ordinate the process. The long-term aim of digitalising and so making it available to the membership (and the public) remains an elusive long-term goal. Please help!

(07) Libroservo

The books which have stayed with Robert Budzul in Tasmania since 2007 have been transported to Melbourne. We will try to sell them.

Finally – after lots of “encouragement” – Robert paid \$1,000, some of the money he owes (owed) to AEA. We continue to hope (esperantisto!) that we will receive the remaining debt.

Unfortunately, we haven't found anyone willing to take on the “libroservo”.

(08) Events

Unfortunately, we are not aware of all the Esperanto events occurring throughout Australia. Apart from our major event, last year's Congress in Canberra and the current congress in Melbourne, here is a summary of the ones we know of:

June: Language Festival at Thebarton Senior College, SA

September: Esperanto Exhibition at the Mitchell Library, SA

July: Language Festival at Redfern Community Centre, NSW

(09) Esperanto TV

One of the exciting new developments in 2014 was the establishment of Esperanto TV.

The estraro was impressed by the work of Richard Delamore and his helpers to establish a vibrant, new way of promoting and practising Esperanto. It has many(??) followers overseas and has attracted new young people to Esperanto.

We are supporting this initiative with a monthly sum of \$200.00 for 15 months. We hope that more Australian Esperantists will get involved in the project.

(10) Website

Another huge thank-you to Jonathan Cooper for looking after our site professionally and efficiently and continuously improving it.

Following several months of very unreliable performance of our shared web-server (including approximately three weeks in May when the website was completely non-functioning), the estraro (except Kam) decided in September to transfer the hosting to a new, cloud-based server, with a company recommended by Jim Radford of Image Direct. This was mostly completed at the end of September. The website has since then been much more stable.

As part of the transfer, all subdomain websites (mostly for state and local groups, e.g.

wa.esperanto.org.au, none of which had been updated for years) were retired and replaced by pages on the main AEA website (e.g. aea.esperanto.org.au/wa). This greatly simplified the task of keeping the website safe from malicious hacker attack.

Unfortunately, as a result of the server down-time and hosting transfer, a comprehensive statistical report for the year is impossible.

Other changes of note to aea.esperanto.org.au include:

- Re-organisation of website structure and menus, as per the workshop at the January 2014 congress
- New section: "News"
- All back-issues of *Aŭstraliaj Esperantistoj*: available for download.

(11) Company to Association

At the AGM during the Canberra Congress the membership voted to return AEA to an association. Unfortunately, this turned out to be more complicated than anticipated and the process is nearly completed. Documents are sent to ASIC and we are awaiting the final confirmation.

(12) Membership

In 2013 we managed to halt the decline in membership and increase it slightly. Unfortunately, the number of members has not increased during 2014. As of the beginning of December we have 103 paid-up members. (111 in 2013)

(13) Esperanto sub la Suda Kruco

Big thanks to Kam Lee and David Ryan for the continued production of our magazine.

Unfortunately, we experienced intolerable delays in the production. Joanne Johns helped with the production and we are extremely grateful for her skills and generosity.

The last issue appeared just recently and we hope to have some good discussions about ESK during this congress.

The discussion to go totally electronic has not progressed.

(14) Local groups

Despite good intentions, and despite this being one of our aims for the year, our contact with groups around the country in 2014 has – unfortunately – continued to be haphazard.

This is what we are aware of:

- **Sydney** – Monthly meetings at Esperanto House (Redfern), Manly and the Central Coast.
- **Melbourne** – Continuing weekly Monday night club meetings. This year welcomed new members and several overseas visitors.
- **Adelaide** – The Adelaide Club meets every first Wednesday of the month and at least 8 times a year for a social gathering.
- **Hobart** – Esperantists participated every Monday in a language group.
- **Queensland** – monthly meetings in Brisbane and Toowoomba.
- **Perth** – monthly meetings.

(15) Finances

The finances for the year show a \$10,000 difference (less) than the Total Equity for 2013. This reduction can be explained by the write off of the debt owed by Penny Voss of \$8,000, a write-down of the value of the books in the Libroservo (\$2,200) and Equipment (\$1000).

Interest rates have also dropped, so income is down on our Term Deposits and this no doubt will continue for another financial year.

The cost of bringing overseas teachers and visitors to our Canberra congress was also a greater expense than we would normally incur.

Regardless of that we are still in a very strong financial position for this financial year 2014/2015.

(16) Points / ideas we would like to explore during the AGM / Congress

- Is it possible/worth organising a joint congress with Indonesia ?
- What is the value of Language Festivals?
- How can the contact with local groups improved?
- Next summer schools? Next congresses
- Does AEA really need (full) financial members? Could it have Internet-only members (who would receive ESK by PDF only)?
- Could / should AEA offer new ways for members to meet and collaborate? E.g. Skype / chat room meetings? Collaboration site (e.g. Create Village) or forum (e.g. Muut)?
- Should AEA revive the libroservo? Could it act as an agent for UEA or Esperanto-USA?
- What involvement should AEA have on social networks? E.g. Twitter, Facebook, Instagram, Pinterest, YouTube, iPernity, Google+...